



TEA-BULTENO

6^A JARO

MARTO - APRILO 2003

NUMEROJ 3-4

Vortoj de la Redakcio

Ni rigardu iom kune en la memorlibro de nia asocio post la paso de ĉi tiuj unuaj monatoj de la jaro 2003^a. Tre riĉaj je gravaj okazaĵoj ili estis. Por tiuj kiuj travivis kun ni ĉiujn momentojn kaj por tiuj kiuj ne havis tiun ĉi ŝancon, mi skizas rapide pro kio mi konsideras tiun periodon tiel grava por nia TEA.

Je la 12^a de januaro okazis la Ĝenerala Jara Asembleo, dum kiu la ĉeestantaro eksciis precize pri la dato de la asocia translokiĝo, kio fakte estis farita la 27^{an} sammonatan. Tiam, pro la multaj tiurilataj elspezoj, estis alvokita la membraro por eksterordinara, financa subteno de TEA. La nova sidejo, **en Via Coroneo 15 en la domo de la Germana Bonfara Instituto**, estis preskaŭ preta por akcepti la meblaron, la libraron, kaj ĉiujn aliajn propraĵojn de asocio, kiu, havante longan historion malantaŭ si, posedas ankaŭ grandegan arkivon kun valoraj dokumentoj.

Sed mi iru iom pli malrapide kaj iom pli detalu la diversajn paŝojn faritajn: antaŭ la translokiĝo, kompreneble, oni devis renovigi la ejojn. Mi rememoras al vi, ke temas pri kvarĉambra oficejo, en malnova palaco, kun altaj muroj, pluraj pordoj, fenestroj, ligna pavimo... *Kial tiom da klarigoj*, eble vi demandos vin. Nu, nur por precize bildigi al vi la situacion alfrontintan de volontuloj kiuj okupiĝis pri normigita funkciado de elektra kaj telefona instalaĵoj, pri farbado de la muroj, pordoj kaj fenestroj, pri posta purigado de la lokalo, antaŭ la enveno de la jam enpakita materialo. Jes, ĉar antaŭ ol ĉion transporti de unu loĝejo al alia, oni devis zorge ĝin enpaki. (Interparenteze dirite, du kamionoj estis bezonataj por la translokiĝo!). Certe nun decus mencii ĉiujn kiuj helpis, sed listo eble tro longus, kaj plie mi timas forgesi iun, kio vere malindus. Tamen mi ne povas pluen iri sen la sciigo, ke nia TEA-ano Gianni Delmonaco, unu tagon post alia, senhalte kaj tute sola, sukcesis en deko da tagoj farbi komplete la tutan ĉambraron. Por vere pesi kiom da laboro estis farita, venu viziti vian asocion kaj mezuru mem!



Poste estis la momento de elpakado kaj distribuado de la materialo en la koncernaj lokoj, kio estis farita en rekorda tempo, dank' al la fakto ke la antaŭa enskatoligo de la diversaj aĵoj estis farita kun saĝa ordo.

Do, tioma estis la fizika laboro, donacita tre malavare de kelkaj membroj de nia asocio. Multaj aliaj tamen ne povis kontribui tiele, sed, por ke la pesiltasoj egalpezu, tiuj, morale kaj mone, subtenis la asocion. Kiam komencis alveni la monkontribuoj, tiam ĝojo plenigis niajn korojn, ĉar tiel multaj el vi klare pruvis sian sinceran

ligon al nia preskaŭ centjaraĝa TEA. Kaj nun vere neblas ne sciigi la nomojn de tiuj kiuj plenumis tre malavare la rekomendon de la Asembleo kaj finance subtenis la asocion.



Jen la listo, laŭ alfabeto ordo:

Edvige Ackermann, Anita Altherr, Lida kaj Pietro Barbieri, Celestino Bertocchi, Antonia Bonomi Spirat (el Tregnago), Bruna Cossa, Liliana kaj Gianni Delmonaco, Elda Doerfler, Maria Grazia kaj Danilo Gerbec, Elio Nocent, Devana Pizziga, Ingrid Signore, Pier Giorgio Soranzo, Giuseppe Valle. Pluraj el la supre notitaj personoj donacis eĉ pli ol la rekomenditan monsumon! Krome la TEA-membroj, loĝantaj en aliaj urboj, pagis al ni jam komence de la jaro sian jaran kotizon kaj ankaŭ tio estas konkreta signo de deziro helpi la asocion en momento iom speciala: Karl Behmann kaj Carla Faccioli el Bolzano, Luigi Tadolini el Forlì, Elfi kaj Milan Sudec el Po-reĉ, Luisa Deganutti kaj Giuseppe Valente el Udine.

Kion aldoni al ĉi tiu signifoplena listigado? Nura granda danko adresita al ĉiuj flanke de la estraro kaj de tiuj kiuj tutkore interesiĝas pri sorto kaj evoluo de Esperanto kaj pri stabileco de asocio, laboranta de preskaŭ 100 jaroj, por ke finfine estu rekonata la valoro de komuna, neŭtrala lingvo por la tuta homaro.

Programo de Marto

Mar 04	Sidejo fermita
Ven 07	Ordigado de la asocia sidejo
Mar 11	Ordigado de la asocia sidejo
Ven 14	Ordigado de la asocia sidejo
Mar 18	Ordigado de la asocia sidejo
Ven 21	Ordigado de la asocia sidejo
Dim 23	Ĉe nia amiko Marcelo Trampuh en Istrio por plantado de olivarbo. Forveturo je la 8.30 horo
Mar 25	Ordigado de la asocia sidejo
Ven 28	El Esperanta Gazetaro

Atentu! Atentu! Atentu! Atentu!

En APRILO estas antaŭvidita la solena, oficiala inaŭguro de la NOVA SIDEJO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO. Oni informos Vin ĝustatempe: nepras via ĉeesto en tiu speciala okazo de la vivo de nia TEA!

Pilongigo de la Semajno de Internacia Amikeco

Venu kun ni en Istrio!



Dimanĉon

la 23^{an} de marto

Ĉe la bieneto de Marcello Trampus en Kaŝtelir ni renkontiĝos kun kroataj kaj slovenaj esperantistoj por festi kaj planti olivarbojn, simbolojn de paco, frateco kaj solidareco.

Se vi deziras planti

VIAN OLIVARBON,

jen unika okazo: tio eblas kontraŭ eta pago de la kostoj.



Programo:

h. 8.30—renkontiĝo ĉe la landlimo Pesek por komuna veturado, aŭtomobile, al Kaŝtelir

h. 10.00—alveno en la bieno de Marcello. Tostado kaj plantado de olivarboj: konsilindas surmeti taŭgajn ŝuojn. Sekvos surloka bufedo, kies koston por persono ni precizigos iom pli poste.

Anoncu vin tuj por plifaciligi
la laboron de la organizantoj!

27^a Internacia Junulara Festivalo en Savona

Itala Esperanto-Junularo invitas vin al sia tradicia jara renkontiĝo, kiu okazos de la 16^a ĝis la 22^a de aprilo en Savona, Italio. La temo estos:

Inter tutmondiĝo kaj lokismo:
kia identeco por gejunuloj?

Tutmondiĝo, *no-global*, G8, socia forumo... Ĉiuj vortoj kiuj cirkulas de buŝo al buŝo kiel legendo; kaj same kiel ĉiu legendo, la diraĵoj tre malmulte proksimiĝas al la vero. Inter tiom da debatoj, artikoloj kaj libroj, pli aŭ malpli seriozaj, junuloj estas la kategorio kiu plej malgajnas. Aperintaj de malmulte ĉe la spegulo de la mondo, ili restas mirigitaj antaŭ la novaj teknologiaj evoluoj, kiuj ja helpas proksimigi la mondon sed aliflanke pligrandigas la diferencon inter "riĉaj" kaj "malriĉaj" landoj. Kion ni povas fari por ke la pozitivaj trajtoj de tutmondiĝo estu atingeblaj por ĉiuj? Ĉu ni junuloj povas kontraŭstari ĝiajn nenombreblajn negativajn sekvojn? Aŭ ĉu ni povas fari nenion, ĉar ĉion decidus plenkresk-

uloj? Dum la Festivala semajno ni klopodos respondi tiujn demandojn, per prelegoj kaj diskutrondoj, ekante precipe de viaj spertoj.

GRAVE!! Dum la Festivalo okazos seminario celanta precipe la aktivulojn de Eŭropaj Esperantaj Junularoj por evoluigi kelkajn kapablojn: kiel prepari financan raporton aŭ subvencipeton, kiel organizi prelegon, kiel skribi gazetan artikolon... Ĉeestu! Vi havos ŝancon lerni ion novan dum vi amuziĝas!

La Ejo: La gastejo "Villa De' Franceschini", lokita sur monteto ene de arbaro, prezentas mirindan panoramon super la golfeto de Savona. La adreso estas:

Via Alla Stra' 29 - 17100 - Conca Verde, Savona
tel. +39 019 263222

Por pliaj informoj, vizitu la paĝon:

<http://iej.esperanto.it/iej/iej/2003/>

NOVA STRATO ZAMENHOF en Francio kaj...

La urbo *Sainte Savine*, apud Troyes - Departemento *Aube*, baldaŭ inaŭguros novan straton kun la nomo de: **Zamenhof - Kreinto de Esperanto**. Tio fariĝis ebla dank' al longaj klopodoj de kelkaj membroj de la Grupo ESPERANTO 10. Bonvolu multnombre sendi gratulajn mesaĝojn al la urbestro de *Sainte Savine* al jena adreso: Monsieur le Maire - Hotel de Ville - 10300 Sainte Savine - Francio. Retadreso: jean-jacques.arnaud@sainte-savine.fr La mesaĝojn vi povos skribi en franca lingvo aŭ en esperanto.

Informis: daniel.perard@libertysurf.fr

...en Italio!

En la januara numero de TEA-BULTENO, estis anoncita la baldaŭa inaŭguro de "Via Esperanto" en **Bolzano**. Plej probable ĝi okazos en marto, sed precizan daton ankoraŭ oni ne scias.

Via Esperanto
Esperanto Str.

Tamen s-ro Behmann jam nun, senprokraste, sendis mapon kaj informojn pri la lokigo de la strato kaj ties atingeblaj. Ĝi troviĝas en metiista kvartalo, I PIANI DI BOLZANO/BOZNER BODEN, tre proksima kaj al la aŭtobusa kaj al la fervoja stacioj. Alvenante trajne, tuj ĉe la stacio oni trafu la aŭtobuson (Sasa) 11, per kiu en kelkaj minutoj oni atingas la lokon. Se oni alvenas aŭtomobile, estas eblo parki je ĉ. dek-minuta piedirado. Kiu deziras kromajn informojn, bv. sin turni al Karl Behmann - Via Mendola, 80/c - 39100 Bolzano-Bozen. Nura rekomendo: laŭ propra eblo, ni klopodu esti multnombraj kune kun la iniciatinto de ĉi tiu por-esperanta kampanjo, okaze de la inaŭguro de la Esperanto-Strato.

... kaj post Bolzano, en **Palermo!**

Ankaŭ en Sicilio, post longega klopodo, s-ro Vito La Colla, ido de la nobla esperanta familio, konvinkis Palerman Urbestraron nomi straton "Via Esperanto". Oni inaŭguros ĝin ĉijare, okaze de la centa datreveno de la unua palerma esperanta grupo.

Informis Angelo La Manna angxelo@lycos.it

DELL'ESPERANTO HANNO DETTO...

C. GARIBALDI, figlia dell'Eroe: Penso commossa che l'Esperanto potrà condurre le future generazioni ad una vera unità dell'Europa.

Kribretante tiel kaj tiel...

Pier Giorgio Soranzo

En ĉi tiu jaro 2003, la esperanta eldono de MATERADA festos sian dudekjaran datrevenon. La romano estas la unua kaj plej fama verko de Fulvio Tomizza.

Mi komencis lerni Esperanton meze de la jaro 1973, sub la gvidado de s-ino Anita Pieri, kaj la tradukadon de la romano fine de la sama jaro kun la nura intenco ekzerci min en la lingvo.

Relegante la esperantan tradukon kun la celo forigi erarojn, multaj memorajoj bildiĝis kaj revivis antaŭ miaj okuloj. Mi revidis min dum la vespera tradukado: tiam mi havis je dispono nur du lerneajn vortaretojn, certe ne sufiĉajn por tiu giganta laboro; plie, la lingvo de la teksto estis ofte raspa kaj de malfacilaj interpretado kaj tradukado, kio bremsis la laboron kaj kaŭzis longajn cerbumadojn por trovi kompreneblajn esprimojn. Plie, ju pli mi enprofundiĝis en la lingvo-studado, des pli evidentiĝis plibonigoj farendaj.

En la monato marto 1981^a mi aĉetis la "PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO" kaj tio devigis min rebonigi la ĝistiaman faritaĵon. Kiam la impona laboro estis finita, mi sendis unu kopion al Mauro Nervi (kun kiu mi tiam korespondis) kune kun la itallingva romano. Tial li povis kontroli paralele kaj la tekston kaj la tradukon. Duan kopion mi sendis ankaŭ al Dieter Brendt: ankaŭ li estis mia korespondanto, plie li estis ankaŭ Esperanto-instruisto kaj ne konis la italan, do liaj sugestoj estis pli atente ekzamenataj de mi.

Kiam la tuto estis preta, mi petis la permeson de tradukado kaj publikigado al Fulvio Tomizza, kiu malavare konsentis. La problemoj ne finiĝis ĉar poste mi devis trovi eldoniston. Unue mi skribis al Lina Gabrielli, kiu petis pli-malpli unu milionon de tiamaj liroj. Mi turnis min ankaŭ al Bruĉjo Kasini, kiu akceptis la eldonlaboron senpage.

Finfine la romano aperis kaj estis prezentita en Gorizia kaj en Triesto, kun bona sukceso. Sekvis multaj recenzoj, ĉiuj favoraj. Inter la recenzistoj citindas Bernard Golden, kiu kritikis, prave, la uzon de la verbo "elmigri". Nu, en ĉi tiu (ĉu lasta?) relegado, jen kion mi trovis; se vi notos aliajn aferojn, bonvolu ilin komuniki al mi: ili estas bonvenaj.

Mallonga resumo de la romano: En Materada, istria vilaĝeto duonvoje inter Umago kaj Buje, vivis familio Coslovich. La patro de Francesco, la ĉefa rolanto de la romano, mortis ne testamentinte. Tial lia frato, Matteo, ruze proprigis al si ĉiun havaĵon de la mortinta frato kaj lasis nenion al la nevoj. La historia fono de la romano enkadriĝas en la jaroj tuj post la dua mondmilito, kiam Istrio estis donita al la tiama Jugoslavio, kiu forprenis ĉiun havaĵon de la italaj loĝantoj. Dank' al Memorando de Londono de 1954, la italoj kiuj restis sub la jugoslavia regado povis elekti ĉu resti ĉu elmigri Italion. La filo de Matteo Coslovich, kiuj longe batalis kontraŭ la onklo, fine elektis la elmigradon.



Paĝo	Linio	Erare	Korekte
9	5	brullignojn	brullignon
10	21	Diodamnu	Kriste
11	6	lia	sia
"	9	vagumante	vagante
"	10	Berton	Berto
"	27	parolon	frazon
12	1	sen ia rimarko al mi	sen atento por mi
"	12	sin kuŝis	kuŝiĝis
13	8	taskon	tasko
"	11	el familio	de el familio
14	17	malforte	avide
17	5	Avemaria	Anĝeluson
"	5	laborumi per	okupata je
19	13	estis	estus pli bone
"	24	koni	scii
"	31	fi-ago	fiago
20	10	en... en... en...	nomatan... nomatan... nomatan... nomatan...
21	3	fi-agon	fiagon
22	23	kiel	kvazaŭ
24	19	kaj pasante	Dum mi piediris tra
25	14	unu monaton unu post la alia	Rafaelo unu monaton post la frato
28	18	ne taŭgas...	Hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi
29	17	elmingropeton	elmigropeton
"	33	elmigri Italion	enmigri Italion
31	10	ekkomencis	komencis
32	27	Italo-n	Italo
"	31	plej alta el ili	pli alta ol ili
35	20	Italo-n	Italo
36	9	kvitacojn	kvitancojn
37	8	spite ke mi ne volis	malgraŭ mia volo
"	13	ne de... sed de...	ne fare de... sed fare de
41	8-9	malaŭte	mallaŭte
"	22	kial	al
42	5	majo	Majo
"	12	for	(forigu)
43	24	Karlon	Karlo
44	29	enzpezon	enspezon
46	1	ekkomencis	komencis
47	18	"kolo"-n	"kolon"
49	9	kiel se nenio okazis	kvazaŭ nenio estus okazinta
"	16	oportunaĵoj	oportunaĵoj
"	20	sajnis	ŝajnis
50	6-7	devigata	devigita
51	2	"kolo"-n	"kolon"
52	22	(fine de la linio)	piedojn de la
"	23	(fine de la linio)	ili leviĝis kun
"	24	(fine de la linio)	sur la ŝul-
53	9	sajnis	ŝajnis
55	19	fraŭloj	gefraŭloj
56	3	al mi	min
"	12	nemulte	nelonge
58	16	nenion pli taŭgan	ĝuste tion
59	7	de	ĉe
"	11	sursele	sur la dorso
60	30-31	propran	sian
66	17	Kiel lasta klopodo	Lastklopode

Daŭrigo en la venonta Tea-Bulteno

Libroj! Libroj! Libroj!

la dua romano pri Komisarino Maigret



Post la sukceso de MAIGRET HEZITAS, kiu estas jam preskaŭ plene disvendita, eldonejo SEZONOJ (Kaliningrad, Ruslando) ĵus eldonis ankoraŭ unu libron de Georges Simenon MAIGRET KAJ LA MALJUNA DAMO. Same kiel la unuan romanon pri komisarino Maigret, ĝin tradukis Daniel Luez. Ĉi foje komisarino Maigret forlasas Parizon kaj veturas al marbordo por enketi murdon.

La libro jam nun estas mendebla ĉe:
Flandra Esperanto Ligo - Frankrijklei 140
BE-2000 Antwerpen, Belgio
Rete: retbutiko@fel.esperanto.be

KASTELO DE PRELONGO en la reto!

712 paĝojn ampleksas la elektronika versio de la romano de Henri Vallienne, nun elŝutebla en eLibrejo (esperanto.nu/eLibrejo). Ĝi estas la unua romano originale verkita en Esperanto, kiu aperis antaŭ 96 jaroj, en 1907. Ŝatantoj de "telenoveloj" kaj "sapoperoj" trovos en ĝi abundon da fortegaj sentoj, trompoj kaj perfertoj, krimaj kaj romantikaj scenoj, sortoturnoj k.s. La eldono estas lingve fidela al la originalo, eĉ kiam la nuntempa lingvouzo ne plu akceptas kelkajn lingvoformojn. La libron preparis, kunlabore, Miroslav Malovec el Ĉeĥio kaj Franko Luin el Svedio.



PER ESPERANTO EN ĈINIO

EL POPOLA ĈINIO fondis Turisman Fakon por akcepti esperantistojn kaj amikojn el diversaj landoj de la mondo. Interesiĝantoj bv. kontakti la Fakdirektoron S-ron Wang Ruixiang. Estas rekomendataj la jenaj itineroj:

Itinero 1 - Orienta parto de Ĉinio: Pekino → Nankino → Suzhou → Hangzhou → Ŝanhajo

Itinero 2 - Silka Vojo: Pekino → Xi'an → Lanzhou → Jiayuguan → Dunhuang → Turpan → Urumqi → Kantono

Itinero 3 - Tibeto: Pekino → Chengdu → Tibeto (Zedang → Lhasa → Xigaze → Lhasa) → Kantono

Por detalaj informoj, skribu retpoŝte al: Turismafakode-epc@sina.com aŭ libroservodeepc@163.com

Poŝta adreso: Turisma Fakoj de EL POPOLA ĈINIO
P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio



Interesa servo!

EVENTOJ, la renoma Esperanto-gazeto, kiu informadis dum 11 jaroj pri la Esperantaj novaĵoj, reaperas, libere konsultebla, kiel plena interreta arkivo. Ĉiu esperantisto povas foliumi ties albumon vizitante la retpaĝojn ĉe: <http://www.eventoj.hu>

En la arkivo troviĝas ĉiuj artikoloj de ĉiuj numeroj de ĉiuj pasintaj 11 jaroj. La plena teksto de la aperintaj 244 numeroj estas foliumebla.

Je dispono taŭga serĉilo!

Vi povas serĉi en la materialo de la arkivo per interreta serĉ-aŭtomato laŭ vortoj, nomoj, k.a. La serĉilo redonas

la artikolojn laŭ kvanto de la apero de la koncerna vorto kaj laŭ freŝeco.

Profitu la saĝecon de Esperantistaro!

En 244 numeroj de EVENTOJ aperis plurcentoj da artikoloj pri faka aplikado de Esperanto, pri movadaj aktivaj aĵoj, movad-organizaj demandoj, pri instruado, ktp. Vi povas ĉiun artikolon libere pluuzi menciante la fonton. Profitu la intelektan laboron de Esperantistoj! Aŭ se vi volas nur simple amuziĝi, legu artikolojn de la rubriko INTERESE.

Serĉu, legu, profitu... - EVENTOJ-arkivo!

Informis Ret-Info

Esperanto-Asocio de Rumanio, kunlabore kun la Balkana Komisiono de UEA, organizas Balkanan Esperanto-Simpozion, ĉe la Okcidenta Universitato de Timișoara kaj la Arta Liceo, de la 1^a ĝis la 5^a de majo 2003.

Temo de la simpozio estas: "Esperanto en Balkanoj".
Kontaktadreso: Aurora Bute C.P. 351 O.P. 1 1900 Timișoara Rumanio
Retadreso: a_bute@hotmail.com

Deziras korespondi kun italoj:

Saluton, kara esperantisto!

Mi estas Ricardo Coutinho. Mi lernas historion en la Centra Universitato de Venezuelo, mi aĝas 22 jarojn, kaj loĝas en Charallave (malgranda urbo ĉe la ĉefurbo de Venezuelo). Mi deziras scii: kia estas la movado de via lando? Nature mi deziras scii, kie estas via lando. Mi ŝatas muzikon, historion, politikon kaj naturecon...

Amike, ĝis la reskribo! vesperto@cantv.net

SOLVO DE LA 1^A KVIZO DE LA JARO 2003

1. Kion signifas la mallongigo INA?

A) Internacia Naturkuraca Asocio

2. Kiun poemon deklamis d-ro L. L. Zamenhof dum sia unua kongresa parolado?

C) Preĝo sub la verda standardo

3. En kiu urbo estas Internacia Esperanto-Muzeo?

A) Vieno, Aŭstrio

Koran dankon al tiuj kiuj sendis la solvon! Ĉi foje estis konkurantoj, sed bedaŭrinde neniu el ili korekte respondis! Tamen, via partopreno instigas min daŭrigi en ĉi lud-ado: ek al la laboro kaj klopodu solvi ĉi duan kvizon.

Mi deziras al vi sukceson kaj bonŝancon!



1. En kiu jaro aperis la unua PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV)?

A. 1934 B. 1970 C. 1976

2. Kion signifas la mallongigo TAKE?

A. Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
B. Tut-Amerika Komisiono por Esperanto
C. Tut-Afrika Komisiono por Esperanto

3. En kiu lando aperis, en 1925, la unua esperanto-poŝtmarko?

A. Germanio B. Sovetio C. Pollando

Enhavo de ĉi tiu Bulteno ŝuldeblas al RET-INFO, NOVA SENTO kaj NUN

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo, 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it

<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349